Mi nomiĝas Eida Messias Lima, kaj estas studentino pri Interlingvistiko kaj Esperantologio en Universitato Adam Mickiewicz en Poznano.

Mi loĝas en Brasília, en la ĉefurbo de Brazilo.

Mi diplomiĝis pri juro kaj nuntempe mi laboras en regiona tribunalo, kiel jur-analisto.

Mi havis mian unuan kontakton kun Esperanto kiam mi estis sepjaraĝa, pere de mia patro. Li tre entuziasmiĝis pri Esperanto, kaj la tuta familio kune komencis studi.

Nuntempe estas mi en la familio la plej entuziasma pri la internacia lingvo. Mi lernis ĝin kaj antaŭ kelkaj jaroj sukcesis trapasis la C1 nivelan KER-ekzamenon.

Mi aktivas en la movado en mia urbo kaj lando. Mi ankaŭ estas lernanto pri muziko en Muziklernejo de Brasília. Kelkaj el vi certe vidis min muziki dum la Universala Kongreso en Bonaero, kie mi prezentis koncerton kaj ludis ankaŭ dum la internacia vespero.

En 2014 mi sukcesis ricevi stipedion de ESF por studi en Poznano, kaj mi vere tre dankas al ĉiuj kiuj helpis/helpas kaj helpos. Mi tamen ankoraŭ bezonas helpon por sukcesi pagi la kostojn de la vojaĝo el Brazilo transoceane al Eŭropo. Tio por miaj financaj ebloj estas vere neebla sen helpo. Mi do, dankas al tiuj kiuj jam helpis min, kaj estos ĉiam dankema al tiuj, kiuj povos helpi min ĝis la fino de la studoj, en 2017.

Post la fino, mi intencas doktoriĝi pri esperantologia temo en la sama universitato.

Amike salutas vin ĉiujn.

Eida Messias Lima